

Ankaŭ en plua adjektivo estas simila devio, sed kun alidirekta ŝanĝo (h > ch):

lingvo	pozitivo	komparativo	superlativo
turke	<i>yakın</i>	<i>daha yakın</i>	<i>en yakın</i>
germane	<i>nah(e)</i>	<i>näher</i>	<i>nächste</i>
Esperantlingve	proksima	pli proksima	plej proksima

Unu grupo da oftaj adjektivoj havas kontraŭsisteman komparacion:

lingvo	pozitivo	komparativo	superlativo
turke	<i>iyi</i>	<i>daha iyi</i>	<i>en iyi</i>
germane	<i>gut</i>	<i>besser</i>	<i>beste</i>
Esperantlingve	bona	pli bona	plej bona
turke	<i>az</i>	<i>daha az</i>	<i>en az</i>
germane	<i>gering</i>	<i>geringer/minder</i>	<i>geringste/mindeste</i>
Esperantlingve	malsignifa, -grava	pli malsignifa, -grava	plej signifa, -grava
turke	<i>çok</i>	<i>daha çok</i>	<i>en çok</i>
germane	<i>viel</i>	<i>mehr</i>	<i>meiste</i>
Esperantlingve	multa	pli multa	plej multa

Por lerni la germanan komparacion bezoniĝas 6 bazaj elementoj, 3 kontraŭ-sistemaj kaj 15 subsistemaj elementoj. Krome la germana uzas ĉe la atributa komparacio la samajn finaĵojn kiel ĉe la pozitivo kaj enŝovas aŭ elĵetas senakcentan e. (26 elementoj).

Post ekzameno de la komparacio de Esperanto, la hispana, la franca kaj la germana konstateblas jena provizora rangordo:

1. Esperanto
2. Hispana
3. Germana
4. Franca

Tiu rangordo respondas al la supre elektita vicordo kaj ricevos precizigon en la pritrakto de la angla kaj rusa komparacioj.

Fonto

Benzer: Eine kontrastive linguistische Darstellung der Adjektive in der türkischen und der deutschen Gegenwartssprache (disertacio), Universität Bochum, 2000.

(daŭrigota)

La urbo kiel vivomedio estas alloga – ankaŭ por vulpoj


Martin EBNER

Enkonduko

Sekuraj dormlokoj, partneroj por pariĝo, abunda manĝaĵo: en la urboj sovaĝbestoj trovas ĉion, kion ili bezonas. Sed la tiucela formigrado de vulpoj el la kamparo povas doni problemojn al ĝardenistoj kaj posedantoj de malgrandaj hejmbestoj. Aldone plialtiĝas la timo antaŭ la vulpa teniozo.

Estas facile nutri sin per forĵetitaj nutraĵrestaĵoj

Ĉu vulpoj siajn homurbajn loĝejojn ekipas en rustika stilo kaj post laborfina ripoztempo revas pri idilia vivo en la kamparo? Ĉu la felportantaj peltobestoj pli bone eltenas la urban aeron ol la homoj? Ĉiam pli da vulpoj loĝas diskrete en homaj setlejoj. Kelkaj el ili eĉ fartas tre bone meze de tondre muĝantaj trafikinsuloj.



Ruza vulpo: manĝi en homa urbo sandviĉrestaĵojn malantaŭ lunĉejo pli facilas ol kapti musojn en la kamparo

“Kvin vulpoj kaptis kvin obezajn kampmusojn grasajn“, tekstas antikva infan-langorompilo. Sed modernaj vulpoj preferas manĝi terpomfritojn kaj sandviĉrestaĵojn. Kial pene laboregi sur la monokulturoj de la kamparanoj, kiam aliflanke la rubaĵo el la rapid-

manĝlunĉejoj estas tiom nutroriĉa? Krome, ĉu ne la ĝardenkolonioj kaj urbaj tombejoj estas multe pli sekuraj por la freŝe naskitaj idoj ol la vasta kampo kaj sovaĝa arbaro, kie daŭre vagabondas ĉasistoj?

Urbomigra tendenco

Ĉe la vulpoj en Britujo, kiujn ne ĝismorte infektis la rabio, jam ekde la Dua Mondomilito oni povas observi la tendencon al urba vivo. En Londono ili formanĝis tute neĝenate la flamengojn de la brita reĝino en la Palaco de Bukinghamo. Ekde la malapero de la rabioepidemia en la 1980-aj jaroj en meza Eŭropo la nombro de vulpoj plialtiĝas kaj speciale en la urbaj aglomeraĵoj. Intertempe vivas en la urboj sur unu kvadratkilometro ĉe ni 10 ĝis 20 vulpoj – dekkoble pli ol en la kamparo.

Plej bone ekzamenitaj estas la urbovulpoj en Svislando, kies nombro kreskis kvaroble ekde 1985. Antaŭ dek jaroj zoologoj, parazitologoj kaj aliaj esploristoj en Zuriko komencis la “Integran Vulpo-Projekton”, kiu okupiĝas pri ĉiuj eblaj temoj ĉirkaŭ la preskaŭ tute ne plu timeme retenaj sovaĝbestoj. Dum la meloj kaj ĉamoj ĝis nun kuraĝas antaŭenpenetri nur en la antaŭurbojn, jam ĉirkaŭ mil vulpoj setlis en la Zurika centro. “Tiu nombro povas plialtiĝi”, supozas la sovaĝbesta biologino *Sandra Gloor*. “Sole la nutraĵ-defalaĵo forĵetita de homoj sufiĉas por nutri kvinoble pli!”

Danĝero por hejmaj bestetoj

La plej multaj vulpoj en Zuriko ne estas enmigrintoj sed naskiĝis tie. Alie ol kamparaj vulpoj, kiuj sole aŭ duope ĉirkaŭvojas, la urbovulpoj vivas en grandaj familioj. Por sekvi iliajn ekskursojn, la esploristoj ekipis 22 vulpojn per kolĉenaj dissendiloj. Dumtage la bestoj dormetas en iu kaŝejo. Se ili tamen sin ie montras, tio estas – laŭ enketaj pridemandoj – por multaj homoj tre ĝojiga afero. Malpli granda estas la ĝojo kaj rabobesta-akceptemo ĉe la posedantoj de kobajoj, junaj katoj kaj kortbirdoj. Precipe en la printempo, kiam la vulpoj treege malsatas, ĉe negardataj bestetoj en la najbareco povas okazi certa malpliiĝo...

Malpli entuziasmaj estas ankaŭ ĝardenistoj. La vulpoj evoluigis tute proprajn ideojn pri la formado de herbejoj kaj verdaj parkaĵ-

oj. Foje ili kavigas siajn loĝejojn, foje ili fosas fuĝovojajn tunelojn aŭ truojn por la nutraĵ-provizoj. Kelkafoje ili fosadas nur pro plezuro. “La fosado estas parto de ilia natura konduto“, konstatas la esploristoj. Por la fortimigo de vulpoj ili rekomendas kovri la grundon per hundoharoj aŭ sekurigi la ĝardenojn per 2 m altaj dratretaj bariloj, kiuj eniĝas minimume 30 cm en la teron.

Portanto de danĝera parazito

La plej granda timo tamen ne koncernas la vulpojn mem, sed la nur 4 mm malgrandan paraziton en ilia intesto, la vulpotenion. Ties perfidajn larvojn la vermoj distribuas per musoj, sed ili ankaŭ povas eniri la homan hepton. La malsano kaŭzata pro tio, “eĥinokoko“, estas mortiga, bonŝance malofta. Beroj, falintaj fruktoj kaj legomoj ĉiuokaze devas esti ĝisfunde kaj zorge lavataj antaŭ la manĝado. Precipe en la riskoregionoj, kiel ekz. la Ŝvaba Ĵuraso en Suda Germanujo, oni devas regule senvermigi la hundojn kaj katojn. Por eviti problemojn, la esploristoj konsilas ne allogi la vulpojn kaj neniuokaze doni al ili nutraĵon. Ilin pli forte ĉasadi, kion postulas la germana Ĉasista Asocio, la svisaj esploristoj konsideras kontraŭproduktiva. Se oni mortpafas urban vulpon, lian enurban vivomedion tuj transprenos enmigrinta kampovulpo – kiu pli ofte ol la urbovulpo estas infektita de la eĥinokoka parazito, ĉar ĝi certe manĝis pli multajn musojn.

Ĝenerale, per pafilo kaj ĉasistokuglo oni eble povas redukti la averaĝan aĝon de la novaj najbaroj sed ne la urbavulpan problemon. Diras la biologino *Sandra Gloor*: “Vulpojn oni ne povas longdaŭre deteni de vivejoj, kiuj estas vulpofavoraj”.

Adreso de la aŭtoro

Martin EBNER

Marienweg 2

DE – 78465 Konstanz / GERMANIO

<martinebner@hotmail.com>

Priaŭtora informo

La aŭtoro laboras kiel ĵurnalisto por germanlingvaj gazetoj. La supra artikolo baziĝas sur lia gazetartikolo “*Die Stadt als Lebensraum lockt – auch Füchse*“ en “*Südwestpresse*“ de la 26-a de junio 2009.